TEA-BULTENO

4ª JARO **JUNIO 2001** **NUMERO 6**

AGENDO

1	V	Prikongresaj laboroj
2	**S**	
3	**D**	
4	L	
5	M	Ordigo de TEA-arkivo
6	M	
7	Ĵ	
8	V	Prikongresaj laboroj
9	S	
10	**D**	
11	L	
12	M	Ordigo de **TEA**-arkivo
13	M	
14	Ĵ	
15	V	Prikongresaj laboroj
16	S	
17	**D**	**Di-servo en Udine**
18	L	
19	M	Ordigo de **TEA**-arkivo
20	M	
21	Ĵ	
22	V	Prikongresaj laboroj
23	S	
24	**D**	
25	L	
26	M	Ordigo de **TEA**-arkivo
27	M	
28	Ĵ	
29	V	Prikongresaj laboroj
30	S	

La redakcio informas

Kara Leganto!

Post du monatoj komenciĝos la 70ª Itala Kongreso de Esperanto kaj vi ja bone povas imagi, kiom da laboro ĝi postulis kaj postulas kaj postulados de tiu manpleno da homoj, ĝin organizantaj. Niaj fortoj, energioj, pensoj kaj tempo estas dediĉataj nur al ĝi kaj pri nenio alia ni povas okupiĝi. Eĉ pretigo de du-paĝa, modesta asocia cirkulero estas en ĉi tiu momento tempo-raba, tial la junia numero estos la lasta kiun vi ricevos dumsomere.

TEA-BULTENO reaperos en septembro - se ni postvivos la kongreson!!! Fidante je via amika komprenemo, samideane ni ĝisrevidas vin, kun la espero havi vin ĉiujn kiel gastojn kaj - laŭ viaj povo kaj volo - helpantojn dum la nacia kunveno.

Ni rekomendas vin viziti nian prikongresan paĝaron
ĉe http://members.xoom.it/verdastelo aŭ
http://www.esperanto.it/fei/congresso/index.html

Librokatalogo de UEA Montrofenestro de la Esperanto-kulturo

La impona nombro de 4387 titoloj troviĝas en la ĵus aperinta 189-paĝa katalogo de la Libroservo de **UEA**. Pli ol 4100 el ili estas libroj, dum la resto konsistas el diskoj, kasedoj, vidbendoj, insignoj kaj aliaj varoj. La nova katalogo, titolita simple **ESPERANTO-KATALOGO** kaj eldonita en 7500 ekzempleroj, havas 40% pli da titoloj ol la antaŭa, aperinta en 1994, kiu havis 3150 erojn. Ĝi ne estas nura prezlisto, sed la varoj estas koncize priskribitaj, krom se la titolo mem jam sufiĉas.

La katalogo estas dividita en 32 fakojn. Ĝian uzon plifaciligas ankaŭ indekso de la aŭtoroj, entute 375, kiuj estas reprezentataj per pluraj titoloj. Al la informa valoro kontribuas ankaŭ multaj reklamoj de Esperanto-eldonejoj.

Plenkolora kovrila foto pri la libroserva butiko en la Centra Oficejo faras el ĝi tre allogan eldonaĵon, kiu certe ne povos manki en iu ajn ekspozicio pri Esperanto. Apud la Jarlibro de **UEA** kaj la adresaro de **PASPORTA SERVO** de **TEJO**, ĝi montras la vivantecon de Esperanto kaj ĝia movado.

La katalogo estas sendita senpage al la dumvivaj membroj kaj delegitoj de **UEA**, al la klientoj de la Libroservo kaj al la Membroj-Abonantoj en pagipovaj landoj. Poste ĝin ricevos kaj la novaj klientoj kaj tiuj, kiuj ankoraŭ ĉi-jare aliĝos al **UEA** en la kategorio Membro-Abonanto. Eblas ankaŭ ĝin aĉeti. Ĝia prezo estas 4,50 eŭroj (plus afranko kaj, por EU-civitanoj, 6%-a imposto).